# Sufikso –uj/o

**La sufikso –uj/o karakterizas aĵon destinitan enteni aŭ produkti tion, kion esprimas la vortelemento.**

Sufiksa rolo 1:
Aĵo entenanta tute en si pli-malpli grandkvante tion, kion difinas la vortelemento.

| | |
|---|---|
| abelo | abel**uj**o |
| akvo | akv**uj**o |
| mono | mon**uj**o |
| papero | paper**uj**o |
| salo | sal**uj**o |
| sukero | suker**uj**o |
| supo | sup**uj**o |

Sufiksa rolo 2:
Vegetaĵo produktanta fruktojn, florojn aŭ semojn montratajn de la vortelemento.

| | |
|---|---|
| banano | banan**uj**o |
| frago | frag**uj**o |
| rozo | roz**uj**o |
| pomo | pom**uj**o |
| pruno | prun**uj**o |

Sufiksa rolo 3:
Lando propra al gento karakterizata de la vortelemento.

| | |
|---|---|
| franco | Franc**uj**o |
| sviso | Svis**uj**o |
| ruso | Rus**uj**o |

Sufiksa rolo 4:
Vazo, kuvo, pelvo, trogo, kesto, lago, ktp..., en kiu estas plenumata procezo precizigita de la vortelemento.

| | |
|---|---|
| fandi | fand**uj**o |
| lavi | lav**uj**o |
| pisti | pist**uj**o |
| rezervi | rezerv**uj**o |
| trinki | trink**uj**o |

Sufiksa rolo 5:
Spaco aparte karakterizata de la vortelemento.

| | |
|---|---|
| esperanto | esperant**uj**o |
| patro | patr**uj**o |

**Ujo: La sufikso –uj/o memstariĝis kun la limigita signifo de vazo, kesto aŭ ia ajn objekto destinita por plene enteni ion materian.**